.

& Azena ruzo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 290 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo sudinsulaj de Jalgrujma balado, movante la lastan verson du versojn supren kaj poste disduigante kaj la strofojn kaj la versojn.>

(#Melodio:

<:29> (/LaLa Tido TiLa La3Mi; La Tildo TiLa; dore mimi fami mimi; reldo mi miLa;

(#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La a)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 /Salon la azeno portis. ; Ĝia2 marŝo ; estis malfacila pro la ; pe2za ŝarĝo.

(×:; **Tondru danco tre ĉarme ; nun tretu fiere ĉiuj en la ĉen' ; staras jen mastrino**.)

’2 Ĝi surborde stumblis, kaj, ; perdinte teron ; el sub la piedoj, falis ; en riveron. …..

'3 Kiam el la akvo rampis ; ĝi al seko, ; ĝi rimarkis ĝoje, kun ; jubila bleko, …..

’4 ke la ŝarĝo, kiu ĵus ; terure pezis ; (ĉar la sal' solviĝis) ; premi preskaŭ ĉesis. …..

'5 (kiam ĝi ŝarĝite iris ; samavoje, ;)× …..

'6 saltis ĝi en akvon de l' ; river' kompleza, ; kiu ĝian ŝarĝon faras ; malpli peza. …..

'7 Ve, sed nun ne salon portis ; ĝi surkorpe, ; spongo ĝin nun ŝarĝis, kiu ; akvosorbe …..

'8 ŝvelis tiel peza, ke la ; ruz-rezona ; besto sinkis sur la fundon, ; mortis drona. …..

'9 Ofte tre sagaca ŝajnas ; la taktiko, ; kiel ĉi azeno sen ; dialektiko. …..

'10 kaj rezulte tamen havas ; ni malŝancon, ; ĉar ni ne esploris ĉiun ; cirkonstancon, …..)